

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale
PLENUMITA 19/09/2019 Kvarcentkvardekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)



Rapide ekrigardu ĉiujn titolojn.

Legu tiujn kiuj interesas vin

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#).

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **826,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **302,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **284,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **240,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.”. N.ro.86



P.A.G. dividas la Primitivajn Adverbojn en kvar specojn. Jen ili estas:

1e. “Tabel-Adverboj”. Ili konsistas el po kvin el la kvin adverboj en la naŭ specoj.

2e. La “Aŭ-adverboj”; kiel “ankoraŭ”;

3e. La “Nesimetriaj Adverboj”, kiel “nun”;

4e. “Neado kaj Jesado”, kiel “ne” kaj “Ŝi ne povis ne vidi tion”;


La Tabelvortoj (la “Korelativoj” en lernolibroj) estas pli-malpli nelingva kreo de vortoj kiuj ankaŭ en la etnaj lingvoj havas certajn signifokunligojn, sed Zamenhof faris la sistemon regula, kvankam ne centprocente (“tie’n, sed ĉu “tiam’n?”).

“ie” estas la Nedifinita Loko, “tie” la Montrata Loko, “kie” la Demandata Loko, “Ĉie” la Kolektiva Loko, kaj “Nenie” la Negativa Loko. (daŭrigota) **Marcel Leereveld**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Kunveno de centra marbordanoj ĉe Wyong "milk factory" kafejo.



Ĉar nia kutima loko nehaveblis, ni ĝuis novan lokon.

Ni havis amuzan kunvenon inkluzivigante ludon nomitan "du veroj unu malvero"

Alan Turvey



“MIA ASOCIO, MIA URBO”:

FILMA KONKURSO VOJAĜIGOS VIN AL MONTREALO

Kadre de la 55-jariĝo de la esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) kaj de la agado por Ĝemelaj Urboj de UEA, ĈRI kun UEA lanĉas la filman konkurson “Mia Asocio, Mia Urbo”. La konkurso celas diskonigi Esperanto-asociojn en diversaj lokoj de la mondo samkiel la lokajn kulturaĵojn de la urboj, kie situas la E-asocioj. Por partopreni kandidatoj devas provizi al la organizantoj mallongan filmon kaj artikolon prezentantajn la E-asocion kaj kelkajn kulturaĵojn de sia urbo ĝis la **30-a de novembro**. La filmoj kaj la artikoloj devas esti en Esperanto, kaj la plej bonaj ricevos premiojn, kiuj povas inkluzivi repagon de vojaĝo al Montrealo, Kanado, por la 105-a Universala Kongreso, kie la premiotaj filmoj estos prezentitaj. Informis **Katja Steele**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)



Mia ĝardeneto de antaŭ 95 jaroj.

NE-ESPERANTAJ MEMORAĴOJ.

Kvankam mi naskiĝis en Amsterdamo, en la centro inter la kanaloj, tri aŭ kvar jarojn post tio mia patro kaj lia patro, kiu havis bankokonton kun mono kaj kiu ne plu apartenis al la laborista klaso, decidis aĉeti farmdomon en malgranda vilaĝo 42 kilometrojn oriente de Amsterdamo. Tiaj farmdomoj konsistis el brika dometo por la farmista familio kun grandega konstruaĵo ligita al la loĝdomo, en kiu granda ejo la dekoj da bovinoj loĝis dum la tro malvarma vintro, kaj tamen melkatis ĉiutage, kaj nutratis riĉe. Dum miaj aĝjaroj de 4 ĝis 9, anstataŭ iri al lernejo, mi prilaboris malgrandan legomĝardenon. Mia patro ricevis permeson ne sendi min lernejen kaj mem instrui min. Li sukcesis nur iomete, kaj kiam mi aĝis 9 li devis sendi min al la publika lernejo. Maltrafi la unuajn tri jarojn de la lernejo ne havis malbonan influon sur mian postan studadon.

Marcel Leereveld.

ESPERANTAJ MEMORAĴOJ.

Estas certa, ke hodiaŭ ne plu ekzistas Esperantisto kiu povas diri “Mi renkontis, aŭ vidis, D.ron Zamenhof. Sed ĉu ekzistas ankoraŭ Esperantistoj kiuj povas diri, kiel mi povas, “Mi renkontis Lydia, unu el la du filinoj de Zamenhof”? Tio okazis en la mezo de la jaro mil naŭcent tridek ses, kiam mi vizitis la Esperantistan direktoron de la radiostacio en la franca urbo Lyon, Liono, por peti al li tranoktadon. Li havis filinon de la sama aĝo de Lydja, malpli junaj ol mi, kaj mi parolis kun ili dum horo, ne sciante tamen ke unu estis la filino de Zamenhof. Nur kiam mi foirlasis la familion, la sinjoro (mi forgesis lian nomon, sed eble estis D.ro Borel, aŭ simila) diris al mi, ekster la ĉambro, kun kiuj mi parolis. Post tio li kondukis min al hotelo, kie li oferis al mi dormĉambron por la nokto.

Mi ja tiun jaron vojaĝis, biciklante, ene ĉirkaŭ Francujo, kiun mi tiutempe ankoraŭ nomis Francio, malĝuste ĉar ankoraŭ ne studinte lingvismon. Kaj krome ĉar mi estis membro de Sennacieca Asocio Tutmonda, S.A.T., kies membroj estis preskaŭ ĉiuj, sed ne ekskluzive, politike maldekstraj. Antaŭ la putĉo de Hitler ĝi havis pli da membroj ol U.E.A., inkluzive de Rusujo. Post la elpelo el Germanujo kaj poste el Rusujo, la membraro estis nur frakcio de kio ĝi estis antaŭe. Mi ekmembris en 1935, post la putĉo de Hitler sed ĵus antaŭ la elpelo el Rusujo, dum kiu elpelo la rusa registaro ŝtelis el S.A.T. ties bankokonton kaj ties vendotan librostokon, ambaŭ konsiderindajn. Tiutempe, kaj poste, mi redaktadis kaj eldonis dudekpaĝan ĉiumonatan Esperanto-gazeton politikan. Ĝia politika tendenco estis marksisma, sed tiu de Rosa Luxemburg, kaj tre forta kontraŭbolŝevisma. Ĉar ni ne sciis kiel nomi nian tendencon en Esperanto, ĉar la naciaj nomoj regule ŝanĝiĝis, ni nomis nian Esperantan grupon laŭ la nederlanda nomo “radencommunisme”. Por traduki tion en Esperanton la Esperanta vorto estis tro longa, nome “konsilantarkomunismo”, kaj ni do uzis la rusan vorton, “sovjet”, en Esperanto la “Sovetkomunista Frakcio en S.A.T.”. Tio kaŭzis iom da miskompreno en la Esperanto-mondo, sed la rusaj cenzuristoj, legante sur la ekstera paĝo la vorton “sovetkomunista frakcio” aŭtomate tralasis nian gazeton, plena je forta kritiko de tiama

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Rusujo, al la antaŭaj membroj de S.A.T. Eĉ post la milito, vizitante bolŝevisman Hungarujon, mi trovis en la Esperanto-biblioteko en Budapeŝto ekzemplerojn de nia kontraŭbolŝevisma gazeto "Klasbatalo". Mi ne klarigis la aferon al la direktoro de tiu Esperanto-biblioteko, ĉar li time forbrulus la gazetojn. Cetere la hungara registaro neniam eltrovis.

Dum mia kvinmonata biciklado ene ĉirkaŭ Francujo, mi vizitis, en la sudo, la "kolonieton" de la konata Esperantisto Karlo Vigier. Oni rajtis resti tie en unu el la dometoj dum kelkaj tagoj, senpage kaj eĉ uzante la haveblan manĝaĵon, sed sub la jenaj kondiĉoj: Oni devis esti Esperantisto, KAJ vegetarano, KAJ nefumisto KAJ nealkoholisto, kaj dum la makfrua vespero ni dancis nudaj en la arbaro en la lunlumo. Dum mi estis tie, ĉeestis nur tri viroj kaj unu juna virino, Margareto. Tiu Margareto poste iris al la landlimo kun Hispanujo por batali kontraŭ la armeo de Franco, la diktatoro. Ja tiam estis la tempo de la hispana interna milito inter la demokrata registaro kaj Franco, kiu lasta fine venkis pro la nereakta helpo de la registaroj de Britujo kaj Francujo. Sed ĉe la landlimo oni diris al Margareto ke ili ne plu akceptas volontulojn el eksterlando, ĉar ili ne havis armilojn nek sufiĉan nutraĵon. Pro ne povi batali kontraŭ Franko, ŝi memmortigis sin. Ankaŭ mi iris, antaŭ ŝi, al la landlimo por tie batali, sed ankaŭ min oni rifuzis, sed mi ne memmortigis min. **Marcel Leereveld.**



La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm ĝis 12 tagmezo, Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da



klubpagota kafo atendas vin. La 21a de septembro estos la tria sabato. Venu. **Roger Springer**



BRISBANA ESPERANTO - SOCIETO
 Kunvenas la duan sabaton ĉiumonate,
 13.30 ĝis 16.00 horo, ĉambro 1.9
 Brisbane Square Biblioteko, Adelaide St.

Vizitantoj estas bonvenaj



**AUSTRALIANS FOR
WAR POWERS REFORM**

La ĉefministro havas la eblecon sole sendi nian militistaron por batali ie en la mondo kaj sen konsulto kun la parlamento.

<https://mailchi.mp/d36107a818b1/war-powers-reform-bulletin-66-strait-of-hormuz?e=c7f5b89b38>

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Kie estas 'Ŝtormido'?

Antaŭ UKE '97, Trevor Steele tradukis la vortojn de aŭstralia filmo 'Ŝtormido' ('*Storm Boy*'), kaj SBS aldonis la E-vortojn en subtitoloj al Betamax vidbendo de 'Ŝtormido'. Pro kopirajtaj kialoj, ni ne vendis kopiojn, sed disdonis VCR aŭ NTSC ekzemplerojn al la ĉefaj E-bibliotekoj. Poste, mi sendis la Betamax vidbendon al E-arkivo en Kanbero. Laŭ mia malpreciza memoro, ĝi estis en griza ujo, eble metala, ĉirkaŭ 35 x 20 x 8cm. Post la morto de la gardinto de la arkivo, mi ne sukcesis malkovri, kien iris 'Ŝtormido'.



Trevor faris DVD-kopion de sia VCR vidbendo, kaj uzas ĝin por instrui. Tamen, DVD diskoj kopiitaj de la Betamax vidbendo estus pli altkvalitaj. Nepras, ke ni trovu la Betamax 'Ŝtormido'-n antaŭ la malapero de maŝinoj, kiuj kapablas ludi tiajn vidbendojn.

Ĉu iu vidis la ujon / Betamax vidbendon en E-arkivo, aŭ ie ajn? Se jes, mi volas, ke firmao faru DVD-kopiojn, por disdoni al la aŭstraliaj E-kluboj kaj al la ĉefaj E-bibliotekoj eksterlande. Poste, eble ni proponu la originalan al la Aŭstralia Filmo-Biblioteko en Kanbero, kie estas taŭgaj kondiĉoj por gardi vidbendojn.

Margaret Furness, Adelaide

Mia duetaĝa balkono. Post unu kaj duona jaroj da planado, por havi laŭlegajn kaj najbarajn aprobojn, kaj trovi taŭgan konstruentrepreniston, la konstruo ekas.

Roger Springer



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Karaj,

Sabaton kaj dimanĉon la 21an kaj 22an de septembro okazos lingva evento en Melburno. Estos bona okazo renkonti lingvoamantojn kaj Richard Simcott, kiu estas fama brita poligloto kaj ankaŭ Esperantisto. Vidu <https://www.thelanguageevent.com/> La evento ne estas senpaga, sed kiel preleganto mi ricevis 2 unu-tagajn senpagajn biletojn. Bonvolu kontakti min, se vi deziras havi unu el la du biletoj. Amike, **Nicole Else** nicole@cryogenic.net



Uzu Esperantajn literojn Ĉ, Ĝ, Ĵ, Ĥ, Ŝ kaj Ŭ

Se vi ankoraŭ ne povas uzi la Esperantajn literojn, uzu la 'x' post la litero kiu bezonas la supran signon

[Esperanto x-system to Unicode - Chrome Web Store](https://chrome.google.com/webstore/detail/esperanto-x-system-to-Unicode-Chrome-Web-Store)

<https://chrome.google.com/webstore/detail/esperanto-x-system-to-Unicode-Chrome-Web-Store>

Kelkaj aliaj proponoj sekvas. Elektu la plej facilan por vi kaj uzu ĝin.

La paĝo <http://lingvo.org/klavaro>, mencias diversajn helpilojn por tajpi la ĝustajn literojn.

Angle <http://en.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters>,

Esperante : <http://eo.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters>

Amiketo ebligas tajpadon de ĉapelitaj literoj <http://www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/amiketo/>

La specialaj Esperanto-literoj estas ĉiuj en la "Latin 3 Symbols" supre dekstre sub "Insert".

Oni alklakas "Insert" kaj dekstre aperas "Symbols". Oni povas instali la Esperantajn literojn sur la klavaron.

Por vindaĵaj komputiloj senpagaj Ek! Aŭ **Tajpi**. Aŭ vidu sube

Unu el la plej facilaj metodoj <http://esperanto.typeit.org/> senpage

aŭ <http://www.typeit.org/app/?lang=esperanto&side> \$US12.50c (A.E. uzas *typeit*)

iPhone Nun estas havebla pli bona Esperanto-klavaro por iPhone/iPad kun iOS8. Oni povas facile ŝanĝi inter la kutima klavaro kaj la Esperanto-klavaro, kaj tajpi rekte en iu ajn

programeto: <https://itunes.apple.com/au/ap/id951119795>

Uzu Esperantajn literojn por Mac OS X [Vidu AE 191 paĝo 3](#)

La epŝta programo "gmail" de Google transsendas la esperantajn literojn tute bone.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE